



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Junio 2008

Tartalom

| | |
|---|----|
| JUNIO | 3 |
| Nederlando, la ĉi-jara kongreslando..... | 4 |
| Esperanto-Festivalo IRIS - 7-14. de julio 2008..... | 5 |
| IRIS 2008 PROGRAMPLANO | 6 |
| Tibor Sekelj (1912-1988)..... | 10 |
| La unua ekspozicio de E-ekslibrisoj..... | 10 |
| Epigramoj | 11 |
| Nordhungario – Literaturo | 12 |
| Aŭtobiografio | 12 |
| Prezentiĝo por miaj amikoj | 12 |
| Sur acerfolion | 13 |
| Historio de la Miskolca Esperanto-movado | 14 |
| Pedagogo-Esperanto-Instruado | 15 |
| Ĉe optikisto | 17 |
| La 2008-a, estas..... | 18 |
| LINGVO – LINGVOJ..... | 18 |
| ESEO..... | 18 |
| KUNSENTO | 20 |

JUNIO



Maturaj riboj

Hura! Alvenis la somero! – ĝojadas multaj. Ja, somere komenciĝas la lernejaj ferioj, kaj multaj gelaboruloj eluzas ĉefe somere la grandparton de siaj jaraj libertagoj, Ek! Alvenis la tempo por malstreĉiĝi, por pli intense partopreni en someraj programoj de urbo Miskolc. La programkajero de urbo Miskolc proponas plej bonajn programojn por la tuta jaro, tamen de junio plimultiĝas ankaŭ la nombro de liberaeraj programoj. Prezentoĝos ĉi-tie ĉio, kio estas plezura por okuloj, oreloj, mensoj!

El tio ni nun prezentas iom, por emigi al partopreno:

- 2-8. Junio. En la reĝina fortikaĵo de Diósgyőr, la tn: „Borsodi Fonó”, infanaranĝaĵo sekvas la majan renesancan aranĝaĵserion „Printempo de reĝinoj.” En ties programo dum eksterlerneja historio-horo la lernantoj povos konatiĝi kun la historio de la fortikaĵo de Diósgyőr, kaj popolarto, popolaj tradicioj de Nord-Orienta Hungario.
4. Junio: okazos la inaŭguro de la nova orgeno de la Avas-monta Kalvinana preĝejo
- 6-8. Junio: Internacia Folklorfestivalo
8. Junio-31. Aŭgusto okazos la 24-a Grafika Bienalo, kiu nun estos komuna aranĝaĵo de urboj Eger, Miskolc kaj Salgótarján.
- 11-22. Junio: okazos en Miskolc, la Miŝkolca Internacia Operfestivalo „Bartók+Slavoj”. Ĉi-foje, krom muziko de Béla Bartók, oni selektis el la operverkaro de niaj slavaj najbaroj. „Kvankam en Hungario ankaŭ plu popularas la itala opero, estas grave ĉerpi ankaŭ el la operoverkado de aliaj nacioj. Tiel ni decidis por niaj najbaroj, por iliaj operoj...” – deklaris Tamás Bátor, direktoro de la Operfestivalo, en la n-ro de la 15a de Majo 2008 de la tagĵurnalo „Nordhungario”.
20. Junio-15. Aŭgusto: aŭskulteblos placmuziko.
26. Junio: ĝueblos koncerto el popularaj melodioj kompilita de la Miŝkolca Simfonia Orkestro.

30.Junio-11. Aŭgusto: en la kadro de la aranĝaĵserio Collegium Musicum: sesfoje estos aŭdebla orgenkoncerto en la Avas-monta monumenta Kalvinana Preĝejo.

El inter la gravaj tagoj ne ellaseblas la 25-a de Junio, kiu estos la Tago de Grotoj!

Antaŭ ĉio ni devas mencii la grotojn de prahomo sur la Miŝkolca monto Avaŝ. Ilin malkovris la multflanka scienculo Ottó Herman (19a jc.), rezulte la de li iniciatitaj arkeologiaj fosadoj. Multloke oni trovis retrovaĵojn, spurojn de iamaj prahomaj setlejoj. Iujn el tiuj grotoj oni iam plenŝtopis, sed aliajn transkonstruis al vinkeloj kaj ili estas uzataj ankaŭ nuntempe. Uzobjektojn de prahomoj oni trovis ankaŭ en la Miskolc-Lillafüreda groto Szeleta (Seleta), ĉe kies enirejo memortabulo gardas la memoron de la prahomesploro. El ties proksima elvidejo bela vidaĵo malfermiĝas al la kontraŭaj montoĉenoj.

Nia alia valora groto estas la fonto-kalkotofa groto Anna sub la terasa parko de Palachotelo, ĉe la akvofalo. Ties interesaj formacioj donas neforgeseblajn travivaĵojn. Pri ĝiaj gutŝtonoj famas la same Miskolc-Lillafüreda groto, Istvan (Stefano), pri kiu jam multaj opiniis, ke ĝi tre similas al la groto Baradla de la Aggteleka-Karsto.

Bonvolu admiri niajn valorojn, partoprenu la somerajn programojn de nia urbo Miskolc!

Adrienne Pásztor

Nederlando, la ĉi-jara kongreslando



Euromast

Nederlando, situanta ĉe la Norda Maro kaj ĉe la enfluejo de tri grandaj riveroj / Rejno, Mozo kaj Skeldo / estas malgranda, dense loĝata kaj tre evoluinta lando.

Pli ol la duono de la lando situas sub la marnivelo, pro kio necesas multaj digoj kaj pumpiloj por teni la terenon seka. La Deltolaboroj, kiuj ekestis post la granda inundo en 1953, nun bezonas aktualigon. La antaŭvidita altiĝo de la marnivelo, la daŭra sinkado de la polderoj kaj la alfluo de la akvomasoj tra la riveroj postulas enormajn laborojn.

Nederlando estas konstitucia monarkio kun parlamenta sistemo. La ŝtatestro estas la Reĝino Beatrix. La sidejo de la registaro troviĝas en 's Gravenhage / Den Haag / Hago /; Amsterdamo tamen estas la ĉefurbo de la lando. Nederlando konsistigas kun la Nederlandaj Antiloj, situantaj en la Kariba regiono, la Reĝlandon Nederlando. Sabate, fine de la kongreso vi povos sperti tiun Kariban etoson dum la somera karnavalo, kiu trairos la urbocentron, sed jam en la antaŭa tago eblos sperti la tiel nomatan batalon de tamburoj.

En Nederlando loĝas pli ol 16 milionoj da homoj. La plej densa koncentriĝo de la loĝantaro troviĝas en la „Randurbo Holando”, la grupo de urboj en la okcidento de la lando: Amsterdamo, Hago, Roterdamo, Utreĥto. La kongresurbo Roterdamo estas urbo kun tre internacia loĝantaro el pli ol 160 naciecoj. Vi do certe havos la eblon konatiĝi kun multaj kulturoj.

Roterdamo ne plu estas la plej granda haveno de la mondo, ĝi tamen estas la plej granda transithaveno por Eŭropo. Kaj en la baldaŭa estonto la havena tereno eĉ pligrandiĝos, kiam oni konkeros pli da lando el la maro por konstrui la duan Mozebenaĵon.

Ĉar la urbocentro de Roterdamo forbrulis, ĝi ne havas historian kernon, sed male ĝi estas konata pro sia moderna arkitekturo. Ĝi havas ankaŭ la mondkonatan artmuzeon Boymans kaj ekzemple modernajn statuojn vi trovos malavare dissemitaj en la urbo.

Sed eble plej interese por esperantistoj estas la urbo de la jubileanta UEA. Kaj ni festos la 100-jariĝon en la centro de nia movado: Roterdamo.

Loes Demmendaal /el la 2008. jara revuo ESPERANTO/

Esperanto-Festivalo IRIS - 7-14. de julio 2008



En julio 2008 urbo Szolnok gastigos la 2-an Junularan kaj Plenkreskulan Esperanto-Festivalon IRIS kaj la 35-an Hungarian Esperanto-Kongreson.

Partoprenkotizo: po 5000Ft (ĉ. 19 eŭroj) tage, kiu inkludas la kostojn de tranoktado kaj manĝado, respektive tiun de multaj programeroj. Ni ofertas ankaŭ al vi eĉ la senpagan partoprenon kun senpagaj manĝoj kaj tranoktado eble eĉ por ĉiuj 7 tagoj, sed eblas partopreni ankaŭ nur kelkajn tagojn. Se vi aktivos en la Festivalo kiel kunlaboranto aŭ helpanto, ni ofertas rabaton en 3 kategorioj:

1. *Helpanto*: al tiu, kiu efektive ĝisfine partoprenas la organizadon kaj aranĝadon, ni donas rabaton de 100%-oj.
2. *Helpanto*: tiu, kiu povas helpi nur en kelkaj programeroj ĝuas rabaton de 50%-oj.
3. *Helpanto*: tiu, kiu helpas nur en unusola programero, ricevas rabaton de 25%-oj.

Registri vin vi povas sur la hejmpaĝo <http://iris.eszperanto.info>. Klakante al la ligilo 'IRIS tagaj programeroj' (dekstre supre) vi povas vidi la ankaŭ la detalajn planatajn programerojn. Se vi havas ajnan demandon aŭ se vi fiaskis ĉe la registriĝo, ni helpas pere de la retadreso mesz@eszperanto.info kaj esperantohea@t-online.hu.

Se vi volas esti daŭre informata kaj/aŭ ankaŭ vi volas partopreni la ĉiutagan, reciprokan informadon vi povas aliĝi al junulara info@heszperanto.hu aŭ al la plenkreskula eszperanto@googlegroups.com korespondlistoj.

IRIS 2008 PROGRAMPLANO

» 2. Esperanto-Festivalo "IRIS" 7-14. de julio 2008. Szolnok, Hungario «



[*] : La kosto de tiuj programeroj ne estas en la partoprenkotizo!

En la tuta semajno: kretendaro de esperantistaj pentroartistoj el urbo Tata (Hungario)

| UNUA TAGO – 07.07.2008. (LUNDO) | |
|---------------------------------|---|
| De 12:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Alveno, registriĝo, okupo de la ĉambroj • Mallonga promenado en la proksimo, sur la Tisza-bordo, manĝado de glaciaĵo [*] en la proksima sukeraĵejo |
| 19:00-20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Interkona vespero ĝis aŭroro (Muziko, danco, noktomeze tombolo) |

| DUA TAGO – 08.07.2008. (MARDO) | |
|--------------------------------|---|
| 08:00-09:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Matenmanĝo |
| 09:00-13:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Karateprezentado • Esperanto-kurso (Stanislaw Mandrak) • Esperanta poemklubo • Prezento de civilaj organizaĵoj de urbo Szolnok • Esperantaj krucenigmoj |

| | |
|--------------------|--|
| | <ul style="list-style-type: none"> •Ŝako-konkuro, Damludo •Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 13:00-14:00 | • Tagmanĝo |
| 14:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Urborigardado en urbo Szolnok: Muzeo Damjanich [*], Artkolonio [*], promenado •Filmklubo (kun Esperantaj filmoj) •Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj) •Esperanto-proveksameno •Lingvoklubo (16:00-18:00) •Literatura kafejo (16:00-17:00) |
| 19:00-20:00 | • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Esperanto-teatro •Karaokeo |

| TRIA TAGO – 09.07.2008. (MERKREDO) | |
|---|--|
| 08:00-09:00 | • Matenmanĝo |
| 09:00-12:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Esperanto-kurso (Stanislaw Mandrak) •Esperanta poemklubo •Urbokona kvizo •Diskutforumo pri Esperanto-movado (Mallongaj prelegoj: max. minutoj – poste demandoj, alparoloj) •Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 12:00-13:00 | • Tagmanĝo |
| 13:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Banado en la strando [*] •Boatveturado [*] •Filmklubo (kun Esperantaj filmoj) •Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj) •Esperanto-proveksameno •Lingvoklubo (16:00-18:00) •Literatura kafejo (16:00-17:00) |
| 19:00-20:00 | • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Salsa-kurso •Ventrodancado •Karaoke |

| KVARA TAGO – 10.07.2008. (ĴAŬDO) | |
|---|--|
| 08:00-09:00 | • Matenmanĝo |
| 09:00-12:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Ekskurso al urbo Kecskemét, al la „Csipero” (X. „Futuro de Eŭropo” Infana kaj Junulara Renkontiĝo) [*] •Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 12:00-13:00 | • Tagmanĝo |
| 13:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Ekskurso al urbo Kecskemét, al la „Csipero” [*] •Filmklubo (kun Esperantaj filmoj) •Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj) •Esperanto-proveksameno •Lingvoklubo (16:00-18:00) •Literatura kafejo (16:00-17:00) |
| 19:00-20:00 | • Vespermanĝo |

| | |
|-----------------|---|
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> •Programo de popoldancgrupo „Jászság Népi Együttes” •Koncerto de Anjo Amika •Karaokeo |
|-----------------|---|

| KVINA TAGO – 11.07.2008. (VENDREDO) | |
|--|--|
| 08:00-09:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Matenmanĝo |
| 09:00-12:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Hungaria Esperanto-Kongreso (Prelegoj de hungariaj kaj eksterlandaj esperantistoj) • Esperanto-kurso (Stanislaw Mandrak) • Esperanta poemklubo • Hungaraj popolkantoj (hungare kaj Esperante) • Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 12:00-13:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Tagmanĝo |
| 13:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Hungaria Esperanto-Kongreso • Prezento de esperantaj organizaĵoj • Filmklubo (kun Esperantaj filmoj) • Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj) • Esperanto-proveksamo • Hungaraj popolkantoj (hungare kaj Esperante) • Lingvoklubo (16:00-18:00) • Literatura kafejo (16:00-17:00) • Ekspozicio de esperantistaj pentristoj |
| 19:00-20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Internacia vespero • Karaokeo |

| SESA TAGO – 12.07.2008. (SABATO) | |
|---|--|
| 08:00-09:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Matenmanĝo |
| 09:00-13:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Instruada Rondtablo • Esperanta poemklubo • Hungaraj popolkantoj (hungare kaj Esperante) • Esperanto-kurso (Stanislaw Mandrak) • Urborigardo en urbo Szolnok • Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 13:00-14:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Tagmanĝo |
| 14:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Instruada Rondtablo • Esperanta poemklubo • Filmklubo (kun Esperantaj filmoj) • Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj) • Lingvoklubo (16:00-18:00) • Literatura kafejo (16:00-17:00) • Ipernity-renkontiĝo • „Tago de fervojistoj” en la proksimo (Riĉa programo kaj por la infanoj kaj por la plenkreskuloj) |
| 19:00-20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none"> • „Tago de fervojistoj” en la proksimo (Riĉa programo kaj por la infanoj kaj por la plenkreskuloj) • Karaokeo |

SEPA TAGO – 13.07.2008. (DIMANĈO)

| | |
|--------------------|---|
| 08:00-09:00 | • Matenmanĝo |
| 09:00-12:00 | <ul style="list-style-type: none">• Esperanto-kurso (Stanislaw Mandrak)• Esperanta poemklubo• Urborigardado en urbo Szolnok (Muzeo pri aviadiloj, Teatro Szigligeti ktp.)• Ipernity-renkontiĝo• Infanprogramoj (Ludodomo, modlado, origamio, puzlo, pupofarado) |
| 12:00-13:00 | • Tagmanĝo |
| 13:00-19:00 | <ul style="list-style-type: none">• Banado en la strando [*]• Boatveturado [*]• Filmklubo (kun Esperantaj filmoj)• Muzikklubo (kun Esperantaj kantoj)• Urbokona kvizo• Lingvoklubo (16:00-18:00)• Literatura kafejo (16:00-17:00) |
| 19:00-20:00 | • Vespermanĝo |
| De 20:00 | <ul style="list-style-type: none">• Adiaŭa vespero ĝis aŭroro (Muziko, danco, noktomeze tombolo)• Karaokeo |

OKA TAGO – 14.07.2008. (LUNDO)

| | |
|--------------------|---|
| 08:00-09:00 | • Matenmanĝo |
| De 09:00 | <ul style="list-style-type: none">• Hejmenveturo... |



Szolnok - Tibiskbordo

Tibor Sekelj (1912-1988)

mortis antaŭ 20 jarojn. Lia agado gravas ankaŭ por ni, kaj por la Nord-hungaria urbeto Abaujszántó. Tie en 1986 li partoprenis la inaŭguron de Kalocsay memorĉambro. Pri lia vivo kaj agado ni rememoros en nia septembra numero, per kiu ni memoros ankaŭ pri la 25 esperantistaj jaroj de naskiĝejo de d-ro Kálmán Kalocsay..

László Pásztor


La unua ekspozicio de E-ekslibrisoj

„... Ekslibriso estas dekoracia signo de posedo de la libro, diranta, ke tiu ĉi libro apartenas al difinita librokolekto, al difinita po

sedanto, kies nomo videblas sur la ekslibriso. Ĝi estas malgranda paperfolio, enhavanta latinan surskribon "ex libris", kio signifas "el librokolekto" au "el la libroj" kaj la nomon de la posedanto de la librokolekto. Oni gluas ĝin al interna flanko de kovrilo en ĉiun libron el la kolekto. La ekslibriso mem, kvankam eleganta maniero signi propran libron, per si mem vekus malgrandan aŭ nenian intereson, se ĝi ne estus akompanata de desegno, kiu devus karakterizi la posedanton au la librokolekton. ...”

Jen fragmento de ekspozicia katalogo. La ekspozicio estas prezentata en Lodza Kulturdomo „502” en kvartalo Widzew. Dank’al la laboro de Zofia Śmistek kaj Mirosław Wojalski lodzanoj povas rigardi unikan ekspozicion de Esperantaj ekslibrisoj. Festa malfermo, en kiu partoprenis aŭtoro kaj gastoj el Lodzo kaj Varsovio okazis je la 22.4.2008. Oni devas substreki ke Esperantaj ekslibrisoj unuan fojon estas prezentataj en konstanta galerio. La kolekton oni povis rigardi ĝis fino de majo.

Robert Kamiński



Epigramoj

1. Nur unufoje dumtage - de la nula, ĝis la 24-a horo,
nur unufoje dumjare - ekde la novjaro, ĝis fino de decembro,
nur unufoje dum mia vivo - ekde la ekvido, ĝis lasta okulfermo -
mi volus vin ami...

2. Denove estas unu tago for, denove ni alproksimiĝis al la fina etapo de feliĉo, kiam ni jam absolute bonfartos, kiam ni pri ĉio absolute indiferentos, kiam nin kapablos movigi nur tertremo, tsunami', aŭ ia simila superfrenzaĵo de nia kara Panjo Tero

3. Bon' matenon, Maten' de mia Sapiro,
Tagmez' de ĝia Estiĝo,
Vesper' de ĝia Realiĝo, Reciproka Sindoniĝo
Centra Komitat' de mia Vivo,
Epicentro de ĝia orbitado:
Vi, ununura Senco de mia sensenca Esto...

4. Bonan matenon!

Kiam do estas bona la mateno? Tiam, kiam en TV-sciigoj oni ne parolis pri ni, ni ne estis objektoj de ia krim-delikto, neniu nin prirabis, nek mortigis, ni ne suferis aŭtomobilan akcidenton, nia domo ne forbrulis, inundo ĝin ne forlavis kaj la polico nin (ankoraŭ) ne arestis...Bonan matenon...!

Teodor Andreas

Nordhungario – Literaturo



Gabrielo Bereti

Aŭtobiografio

Mi naskiĝis en jaro 1948. Mi vivas en Miskolc. Mi estas bibliotekisto. Ekde februaro de 2008 mi estas ano de miŝkolca Esperanto-grupo de HEA. Mia grupestro estas Jozefo Dudás, kiu jam esperantigis miajn kelkajn poemojn.

Delonge mi interesiĝas pri la literaturo. Mi skribaĉadis miajn poemojn ankoraŭ en mia mezlernejana aĝo. Certe mi povus nur rideti, se tiuj troveblus nuntempe. Sed la tempo pasis, mia interesiĝo larĝiĝis kaj mi provis multajn literaturajn ĝenrojn, eĉ krom kadre de la artoj. Ĉi tiel en la pasintaj tridek jaroj miaj poemoj, kritikoj, noveloj, eseoj, recenzoj aperis. Eĉ dum la pli lasta tempo mi interesiĝas ankaŭ pri fotado. Eblas, ke tro multĉion mi komencas fari, anstataŭ tio, ke iun temon mi povus pli bone ĝisfundigi.

Nuntempe mi pensas tiel, se veras tiu ekonomia pretendo, la konformiĝado estas ĉefe demando de la staturo (*(karaktero)*).

Mia novelvolumo aperis en jaro 2000, ĉe eldonejo „Supera Hungario”.

Miaj skribaĵoj dum la pli lastaj jaroj estas legeblaj inter aliaj en la sekvaj revuoj: Magyar Napló, Hítel, Ezredvég, Új forrás, Napút, Polisz, Új holnap, Tekintet, ktp.

Mi ne partoprenis literaturan konkurson, mi ne ricevis premion, mi ne atingis klasigon.

Nuntempe mi ne estas ano de kreanta komunumo.

Tradukis: László Pásztor

Gabrielo Bereti

Prezentiĝo por miaj amikoj

Redaktantino de tiu ĉi informo-fonto Adrienne László Pásztor, mia kara konatolino, proponis kare la eblon por prezenti min sur paĝoj de la Nordhungaria Informo.

Mi faras tion ĝoje, ĉar mi estas engaĝiĝanto: lingvo, movado kaj ideo. Spite de tio, ke mi ne uzas la lingvon en la praktiko en la labortagoj pro miaj vivkondiĉoj. Pro tio mi forgesis multĉion.

Estas fakto, ke mi lernis iam la lingvon, mi klopodis alproprigi tiun, kvankam neniam sukcesis altgrade. Sed ankaŭ nuntempe Esperanto-fakrondaj travivaĵoj de mia studentaĝo apartenas al la plej karaj memoroj de mia vivo. Nome por esti fakronda ano kaj disĉiplo de s-ro instruisto D-ro Zoltán Árokszállásy en la gimnazio „Földes Ferenc” signifis neforgeseblan travivaĵon. Liaj larĝaj vidkampaj, originale viglaj, elanaj prelegoj kaj konigoj pri la lingvo kaj pri ankaŭ la ideo estis konvinkintaj kaj metis min al kredulo de Esperanto. Nuntempe ĉ. post kvindek jaroj jam mi povas aserti, ke sincereco, rigora pretendemeco de sr-o instruisto D-ro Zoltán Árokszállásy influis ankaŭ pli malfruan formiĝon de mia vivo.

Kvankam la cirkonstancoj tiel formiĝis, ke mi mem ne serĉis la eblecon por renkontiĝi kun la lingvo, ĉar ne eblis en la labortagoj apliki ĝin, sed mia koro ne forgesis tiun.

Se mi aŭdas ĉirkaŭ mi esperantan vorton, ankaŭ nuntempe mia koro ekbatas kaj neniam mi preterlasas, ke mi parolu por intereso de Esperanto.

Tio ĉi estas bezonata eĉ en la de mi reprezentata pasiva formo. Nome ĉiutage ni estas atestantoj de iu lingva diskriminacio, kiu donas por la angla lingvo avantaĝojn kontraŭ aliaj lingvoj kaj helpas la anglosaksan mondregnon. Nome estas ofendo por mi, kiu parolas iun malgrandan lingvon kiel patrolingvo kaj kiu konsideras Esperanton kiel lingva egalrajteco de la popoloj. Neeviteble ĉiuj naciaj lingvoj estas ankaŭ ilo de la nacia interesrepresentado – ofte al malutilo de aliaj nacioj. Nur Esperanto estas tiu, kiu estas egaldistance de ĉiuj lingvoj kaj naciaj interesoj.

Nur Esperanto estas lingvo de la libereco kaj la egaleco.

Miaj amikoj! Ni kuntenu por Esperanto je intereso de la libereco kaj egaleco !

Esperantigis László Pásztor

GABRIELO BERETI

Sur acerfolion

La lontano ridas. Ĝia estas la morg’.
Nubombroj torporas sur mia vizaĝo.
En neĝa lumo de l’ Luno trempiĝas,
trempiĝas nia somero.
En mantelo staras ĉiu floro, seklumo zumas,
kaj inter la ŝtonoj en akvohaŭto
lacerto kuras, vento tusas. Dolĉrideto,
bubruĝo frostotremas sur viaj lipoj. Samtempe
eklumas ĉiuj sezonoj, viajn plenmamojn
mi kisas. Kirla nokto de via hararo fendiĝas:
falas el ĝi ĉio –, elĉerpiĝas kaj restas.
Muĝas en la glaciejon-fermiĝinta neĝoŝtormo.
En la strato de la brakumado, nun mi estas sole;
inter la sorbitaj lumoj brilas la unua posttagmezo;
via rideto trembrilas, kaj denove sur min lirlas,
forprenas, brakumas, fortiras kaj surtretas min;
ĉion faligas je eĥo la neĝblovo. Minuto, kaj la tempo,
kiel la imago kunfluis. Larmon kaj rideton rulis.
Ridas la foro. Sur flaviĝintan acerfolion
memore mi surskribas vian nomon.

El la hungoriginalo tradukis:
JOZEFO DUDAŠ

Stefano Pál
Historio de la Miskolca Esperanto-movado
-daŭrigo -
-Kvara parto -

La 3. renkontiĝo -- strato Zamenhof kaj fonto-Esperanto

Jam komence de 1960 informilo kaj programo aperas pri aranĝado de la 3. Nordhungaria Miŝkolca Esperanto-Renkontiĝo. La fervojistaj kaj sindikataj urbaj esperantistoj prepariĝadas intensive. Ludoviko Solticzky - kiu estas referanto de financaj aferoj de la Urba Konsilio - agadas pri nomiĝo de strato Zamenhof kaj la fervojistoj iun fonton dezirus nomiĝi pri Esperanto. Ambaŭ sukcesas kaj la 14-15-an de Marto al Miskolc vizitanta grandnombra esperanto-societo havis travivaĵvriĉajn tagojn.

Dum la du tagoj Julio Baghy ekzamenis A,- kaj B-ekzamenantojn. La festa kunsido estis denove en solenejo de la Urba Konsilio, kie D-ro Ludoviko Gyóry Nagy prezidis. Dum la dua tago ĉe strato Zamenhof Ludoviko Kókény festparolis, posttagmeze en Lillafüred Ludoviko Király inaŭguras la fonton-Esperanto. Interesaĵo de la programo estas, ke la ĉeestantoj ekiris de la miŝkolca Esperanto-placo al Lillafüred per la Malgranda Arbara Vagonaro kaj de tie perpiedis al la sur bordo de lago Hámori estanta Esperanto-fonto. La renkontiĝon salutis telegrafe la moskvaj esperantistoj kaj Marjorie Boulton, verkistino el Anglio, kiu riĉigis la ekspozicion de valoraj aĵoj.

La 15-an de Majo 1960 festas Ludoviko Király en Kossuth-strata rezidejo 50 jaran jubileon, kie ĉeestis liaj estimantoj, disĉiploj, konatuloj kaj lia familio. Li skribis -- bedaŭrinde nur kelkpaĝan -- rememoron okaze de tiu ĉi, kiu estas valora fonta materialo.

En 1960 la sindikata Esperanto-grupo elektis novan estraron. En tiu organiza sekretario estis Stefano Pál, prezidanto estis Ludoviko Solticzky, honora prezidanto estis Ludoviko Király, kasistino estis Márta Vári kaj bibliotekistino estis Angéla Petőfi.

Malgaja jarkomenco -- Departementa Komitato

Jaro 1961 komenciĝis per funebro de la miŝkolcaj esperantistoj. La 10-an de Januaro mortis Ludoviko Király, post lia 50. jaraĝa jubileo. La fakrondo, kies honora prezidanto estis, eldonis esperantlingvan funebran anoncon, dum la entombigo Ludoviko Solticzky diris esperantlingvan funebran parolon. En Informilo de la Sindikata Esperanto-Fakrondo aperis nekrologo pri Esperanto verkaro de Ludoviko Király. Lian mortofamon liaj disĉiploj konsterniĝante akceptis kaj per poemoj, leteroj rememoris lian verkaron.

En 1961 signifa okazintaĵo estis la fondiĝo de la BAZ-departementa Teritoria Esperanto-Komitato, kiu eldonis tri cirkulerojn por karakterizi la okazintaĵojn. Solticzky estis sistema kunlaboranto de la "Hungara Esperantisto", de gazeto de HEA. En tiu ĉi inter aliaj komunikas tiun Kalocsay- memorgesperon, kiun oni aranĝis la 26-an de Oktobro 1961. Tiun D-ro Ludoviko Gyóry Nagy prezidis, Ludoviko Kókény parolis pri vivo de Kolomano Kalocsay kaj mem Kalocsay, la mondfama verkisto prelegis sub titolo " Esperanto kaj la literaturo."

La 8-an de Majo 1961 fondiĝas en Diósgyőr éa "Szinva-vala Esperanto-grupo, gvidita de Jozefo Lőrinczi.(ĉi tiu estas kvara grupo de Miskolc.)

La 3-15-an de julio 1961 Julio Baghy faris grandsukcesan lernokurson por pedagogoj en la "Földes Ferenc" gimnazio, kiun partoprenis 64 partoprenantoj.

Pedagogo-Esperanto-Instruado

1962-1968

1963. Julio Baghy en Miskolc.

Marmortabulo en la groto -- La unua lernejo

De Februaro 1962 D-ro Ludoviko Győry Nagy denove gvidas du Esperanto-lingvokursojn. En la Miskolc rezideja Departementa Juĝejo kaj en la Urbdomo estis la lernokursoj, el inter ties partoprenantoj 4 personoj aliĝis al la miskolca Centra Esperanto-klubo: D-ro Francisko Gárdus kaj D-ro Ladislao Székely, juĝistoj kaj fraŭlino Adrienne Földi.

En Majo de 1963, Julio Baghy prelegas, en Junio oni inaŭguras marmor-memortabulon en Aggtelek, en la gutŝtongroto. En Julio Ludoviko Solticzky kaj la sindikata grupo florkronas en Miskolc la Esperanto-placan memortabulon.

En Mezökövesd kaj en Kazincbarcika daŭriĝas la Eo-vivo, kie Stefano Pál komencis unue por instrui Esperanton. Ministerio pri Klerigaj Aferoj permesis - de 1963 en la mezlernejoj kiel fakultatan studobjekton, en bazlernejoj kiel lernokurson - instruadon de Esperanto. En gazeto "Köznevelés" (Publikedukado) aperas iu entuziasmiga artikolo por la pedagogoj, somere de 1964, kiu entuziasmigas la pedagogojn por instrui Esperanton.

Saĝan antaŭvidon de D-ro Ludoviko Győry Nagy laŭdas, - kiu prezidanto de BAZ-departementa TEK -- ke antaŭ apero de la dekreto prizorgigis la lingvan-instruadon de pedagogoj.

En 1964 pro malsano de Julio Baghy D-ro Ludoviko Győry Nagy petis D-on Franciskon Jáky por antaŭprepari la aŭskultantojn al la bazgrada ekzameno. Post finlegado de "Verda vojo", etromano de Julio Baghy, sekviis la ekzameno. La 27-an de Aŭgusto 1964 inter la sukcese bazgrade ekzamenantoj estis Maria Busai, s-rino Károly (Karlo) Olajos instruistinoj, Julio Bossányi direktoro kaj fraŭlino Adrienne Földi.

La 1-an de Oktobro 1964 en Szirmabesenyő en la bazlernejo komenciĝis en la 3.-4. klasoj la Esperanto-lingvoinstruado kun Julio Bossányi, direktoro, Maria Busai kaj s-rino Károly Olajos, pedagogoj. Ĉi tiun laboron la miskolcaj esperantistoj de la ekiro helpis. En Kolegio "Petőfi" daŭriĝas la instruado de Esperanto jam kvin jarojn. (La lernokurson Ludoviko Király komencis en 1960, poste daŭrigis Stefano Pál kaj Stefano Temeši.)

La Eo-grupo de DKS (=Departementa Kulturdomo de Sindikatoj) havis 37 anojn kaj riĉan programon. Ili aranĝas ekspozicion kaj projekcias filmojn.

Nova Esperanto-grupo en Diósgyőr.- Junulara grupo en la "Földes Ferenc" gimnazio

En bazlernejo de Szirmabesenyő jam 80 gelernantoj lernas Esperanton, kiujn ankaŭ Julio Baghy vizitas en akompano de la miskolcanoj. En Kazincbarcika 40 partoprenantoj renkontiĝas kun 10 polaj esperantistoj kaj kun esperantistoj de 8 urboj kaj setlejoj.

En Diósgyőr en la nova "Ady Endre" kulturdomo de la 1-a de Marto 1965 Jozefo Balázs,

direktoro permesis por Stefano Pál, ke organizu lernokurson kaj fondu fakrondon, kiujn li gvidis ĝis 1975. Tiu fakrondo havas 20 anojn. Anoj de la grupo estas veteranaj laboristaj esperantistoj. Ili elektas Adalberton Lehóczky kiel honoran membron.

En la "Földes Ferenc" gimnazio la miŝkolca Pedagogia Esperanto-Fakgrupo fondas junularan sekcion la 21-an de Oktobro 1965. Ĝi havas gimnazianojn kaj memstaran estraron.

La 17-an de Junio 1965 en teatrejo de sindikata rezidejo okazis memstara esperanto-vespero de pioniroj de Szirmabesenyő, kie 200 personoj aplaŭdis entuziasme, esprimante ilian plaĉon. Tie ĉeestis ankaŭ Julio Baghy, honora prezidanto de HEA. La sekvontan tagon estis literatura vespero de Julio Baghy, kie oni eternigas sur sonbendo liajn eternajn valorajn prelegojn, poemojn. La departemento kaj Miskolc kontentige donas informigon pri tiu, ke - krom la pedagoga kaj la du fervojistaj grupoj - havas ses Esperanto-grupojn, kaj dum dek lernokursoj oni lernas Esperanton. En urbo Szerencs en la gimnazio "Bocskay" unue estas Esperanto-klasifikaĵoj en atestiloj de 35 gelernantoj.

Mondkongreso en Budapeŝto - Per ekstra trajno kaj per ekstraj aŭtobusoj al Aggtelek

En 1966. la miŝkolcaj kaj departementaj grupoj havis riĉan programon. En Kazincbarcika oni nomumas Esperanto-promenejon. Ankaŭ la szirmabesenyőanoj prezentiĝis en Budapeŝto dum la mondkongreso, kie el 10 landoj 100 infanoj donis programon. La miŝkolcaj grupoj inter la 30-a de Julio kaj la sesa de Aŭgusto 1966 aranĝas prelegojn, poste lernokursojn. Adrienne Földi havis helpan rolon dum la 52. UK, dum ekskurso de Budapeŝto al Aggtelek, al la gutŝtongroto de Aggtelek. En Miskolc organiza komitato formiĝis. La 220 personan multnacian esperantistan grupon 4 grupestroj akompanis: Adrienne Földi, Márta Váry, Stefano Pál, kaj Stefano Temesi. Dumvoje ili konigis vidindaĵojn de la regionoj kaj esperantigis la hungarlingvan tekston laŭ la pli frue ricevita fakmaterialo per la grotaj vidindaĵoj.

ĉi tiun ekskurson organizis D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj Stefano Temesi.

En 1967 estas 10 jara la Esperanto-fakrondo de "Rónai Sándor" departementa kulturdomo. La klubokupiĝojn vizitas reciproke la miŝkolcanoj, szerencsanoj, kazincbarcikaanoj, mezőkövesdanoj. Denove okazas malgaja okazintaĵo. La 18-an de Marto 1967 mortis Julio Baghy, mondfama esperantista verkisto kaj poeto. Dum lia entombigo ankaŭ la miŝkolcanoj ĉeestis. Stefano Pál partoprenas en la Federacia Respubliko-Germanio / FRG / en Fulda dum Fervojista Mondkongreso kaj en Hamburgo dum la Landa Eo Kongreso kiel delegito de la fervojista Esperanto-fako.

Miŝkolca informilo de fervojistoj - Veteranaj esperantistoj

Pli nova sukceso de la miŝkolca pedagoga Esperanto-instruado estas, ke en bazlernejo de Nyékládháza instruas s-rino Géza Kóródy. En 1968 jam kun 85 gelernantoj konigas Esperanton kaj ne delonge ili prezentas memstaran programon.

En la sindikata kulturdomo anoj de la Esperanto-grupo rememoras pri la Internacia Virintago kaj ankaŭ foton aperigas iu enlanda kaj eksterlanda gazeto. La "Hungara Fervojista Mondo" eldonis en 1968 miŝkolcan aldoniĝon. En ĉi tiu aperas skribaĵoj kaj tradukaĵoj de Georgo Habel, Márta Váry, Angela Petőfi kaj Stefano Pál. Pri Tiszai-stacidomo, pri Lillafüred-a arbara vagonaro, pri fervoja ponto de Hejőcsaba kaj pri personoj de Kolomano Kando kaj

Julio Baghy.

Daŭriĝadas la grandnombraj lernokursoj kaj ekzamenadoj. Kreskiĝas nombroj de Esperanto-grupoj. La 29-30-an de Junio 1968 dum amika programa renkontiĝo oni salutas Adalberton Lehóczky kaj Ludovikon Solticzky, veteranajn esperantistojn honorigante ilian 50-jaran Esperanto-verkaron. Ambaŭ du estas anoj de la movado. Adalberto Lehóczky havas meritojn por miŝkolca funkciado de la Laborista Esperanto- societa vivo kaj Ludoviko Solticzky havis meritojn pro tio, ke li sukcesis atingi prinomadojn de la placo Esperanto kaj strato Zamenhof.

- daurigo sekvos –

(Rev: Teo Andreas Košice - Esperantigis László Pásztor)

Ĉe optikisto

Vi venis al ekzameno,
Havas bonan sxancon,
Ankau cxe mi jam okulo
Vidas bonan lanson

Havu lokon sur la segxo
Apogu vin dorse,
Kredu, tio ne doloros,
Sidu nur komforte!

Kovru mane nun okulon,
Restu tiel longe,
Kiel vidas vi montritajn,
Diru nun aplombe!

Gxuste kovru nun l'alian,
Rigardu malstrikte,
Konfesu! - Mi cxi-metodon
Ne spertis distrikte.

- Venis tempo de la tasko,
Kelkajn lensojn testi,
Dum via malklara vido
Ja ni devos resti

Sume, niaj cxiuj agoj
Gajnus tiel sencon,
- Vanas tamen la belig', vi
Ne vidas l'esencon.

- Acxetu do okulvitrojn
Per ili vi vidos,
Se amik' cxe via dorso
Moke vin imitos!

Esperantigis: János Kisspál - Mezökövesd

Adrienne Pásztor

**La 2008-a, estas
Jaro ankaŭ de la
LINGVO – LINGVOJ**

Eseo

-daŭrigo –
-Parto II-a -

La plej grandsignifaj lingvofamilioj de la mondo estas:

La multspecajn lingvojn, laŭ ties proprecoj, oni rigardas kiel klasifikitajn en grupojn, lingvofamiliojn. Laŭ la Nova Hungara Leksikono, eldonita en 1961, la plej grandsignifaj lingvofamilioj de la mondo estas:

La Hindeŭropaj-lingvoj (Hinda, Persa, Armena, Greka, Albana, Novlatina, Kelta, Germana, Baltaj-lingvoj, Slavaj-lingvoj), Uralaj-lingvoj (Finn-ugra, Samojeda), Altajaj-lingvoj (Mandĵu – Tungusa, Mongola, Turka, Oguza, Kipĉaka, Ĉuvaŝa, Jakuta, Tatara, korea, Japana), Kaŭkazaj lingvoj (Kartvela, Abhaz-adigea, Veinaha, Dagestana) Dravida-lingvoj (Tamil-Kuruka, Kannara, Telugua), Tibet-Ĉina-lingvoj (Ĉina-Thaja, tibeta-Burma), Austroaziaj-lingvoj (Khasinokobara, Mon-Khmera, Munda), Aŭstroneziaj lingvoj (Indonezia, Polinezia, Melanezia), Paleosiberiaj-lingvoj (Ĉukĉa, Burjaka, Kamĉadala, Fukagura, Ĉuvaŝa), Semita-Hamita lingvoj (*Semita-lingvoj*: Araba, Hebrea, Etiopa), *Hamita lingvoj*: Berbera, Tuarega, Kuŝita, somala, Galla ktp), Bantuaj –lingvoj (Suahela, Zulu, Ruanda, Asanta...), Sudanaj-lingvoj (Hausa...), Khoinaj-lingvoj (eskimoa, Aleuta), Indianaj lingvoj (Algokina, Irokeza, Siva, Ubo-Azteka, Majao), Aŭstraliaj-lingvoj.

Se ni parolas pri lingvoj, ni parolas ne nur pri la nacilingvoj, sed ankaŭ pri la dialaktoj, ĵargonoj, slangoj. Nun jam ni povas paroli inter aliaj pri: lingvoj de la biblio, filozofio, politiko, literaturo, (ene de ĝi pri lingvoj de la poezio, kritiko kaj traduko), pri la meteologio, sporto, sciencoj, teĥniko, teatro, ĵurnalismo kaj mi povus vicigi multe plu.

Inter miaj legaĵoj mi renkontis ankaŭ tiujn historietojn, en kiuj priskribitaj estis; ke iuj homoj konis lingvojn de la bestoj. Ĉi tiuj estis fabeloj, sed estis tiel interesaj, ke ni povas akcepti ilin veraj, ĉar la vivo havas eksterordinarajn eventojn, kiuj naskas esceptajn solvojn. Ĉi tiaj historietoj estis kolektitaj de la hungara popolfabelkolektanto kaj prilaboranto Benedek Elek, kiuj pritemas pri konoj de lingvoj de la serpento, urso kaj la birdoj. Aŭ, jen historieto de la siuoj: lupu grego nutris iun indianon dum tuta vintro, kiam li ne povis reiri al sia tribo pro la neatendite subfalinta neĝo. Kaj simila historieto estas la historieto de Maugli – filo de

ĝangalo. Ankaŭ lupoj nutris Romulon kaj Remuson, fonditojn de Romo. Ĉi historietoj sugestas se homo kaj besto reciproke sukcesas ellerni la lingvon de la alia, la komunikado povas esti sukcesa ankaŭ inter la homoj, eĉ se la diferencoj estas grandaj.

Sed la mondo de la homoj, estas pli komplika, ol tiu de la bestoj. Ĉi tie denove antaŭeniĝas la kono, neceso de plurlingvoj. Tiu fakto, - kiome necesas la scio de almenaŭ du lingvoj kaj pluse de Esperanto, montras la sekva kazo:

Per miaj bazgrada angla kaj kelkvorta germana lingvoscio + supergrada esperanto-lingvoscio, mi funkciis tri tagojn kiel interpretisto magazena je peto de la tieuloj, post la de mi farita helpo de la vendistoj – en urbo Split (Kroatio) en majo de 1973. La monsumo ricevita pro mia ĉi helpo; egalas per mia tiama hungaria unu monata salajro. Post fino de la interpretado la vendistoj demandis min, kiun lingvon mi uzis kiel trian. Je mencio de esperanto, ili diris mire: ili ne pensintus, ke Esperanto povas funkcii tiel bone, kiel komercista helplingvo.

Jen, ĉi kazo estis por mi la plej manprenebla rezulto de mia lingvoscio, kaj ĝis nun unu plej interesa travivaĵo. Sed, tion ĉiu akceptas, ke unu homo ne povas ellerni ĉiun lingvon de la mondo. Ne ĉiuj povas komprenigi sin per ĉiu naciano, kvankam ankaŭ en nia epoko vivas homoj multlingvojn konataj.

Problemon de la multlingvismo en la antikva epoko konis jam ankaŭ la asiroj, judoj. Pri tiu temas historieto de Turo de Babelo. La babelanoj pensis, ke la forresto de finkonstruo de turo pro la lingvakonfuzo babelo, estas puno de Dio. Ili provis solvi la situacion, en intereso de la kulturo, la sciencoj, en kortegoj de la reĝoj, regnestroj, kaj la plibonigo de la tiamaj komercaj rilatoj. Estis paralele uzitaj lingvoj. Unu kulturan, la alian komercan celon servis. Tiuj-ĉi estis: la ŝumera-akada, pli malfrue la klasikalatina-vulgarlatina, sed funkciis ankaŭ ties miksaĵlingvoj, kiu estis ekzemple la prahebrea-arama kaj la greka-latina, kiel ni povas legi pri tiu en la libro, titolita „Gvidlibro por Supera Ekzameno (1966). En la mondo multaj scienculoj okupiĝis kaj okupiĝas ankaŭ nuntempe pri la problemo de la multlingvismo. Ĝis nun kreiĝis ĉ. 120 planlingvoj. Inter ili estas ekzemple la kreo de la mondfama matematikisto Bólyai János (Johano Bojai) kaj eĉ de ok hungaraj sciencistoj (Gvidlibro...).

Doktoro L.L.Zamenhof pola okulkuracisto ekirigis sian planligvon en 1887. Tiu iĝis viva, evolukapabla, lingvo, uzata jam de 121 jaroj. Li rezignis sian aŭtorajton kaj li transdonis sian verkon al la mondo. La vortostoko kaj gramatiko de Esperanto estas konstruita el la okcidenteŭropaj lingvoj kun miksaĵo de slavaj-vortoj. Ĝia logika gramatiko estas facile ellernebla, kaj tiu-ĉi estas avantaĝo en la lingtvolernado.

Sed, kiel ankaŭ ĉe aliaj lingvoj, ankaŭ – ĉe tiu ĉi, - la tempodaŭro de ellerno de ĉi lingvo dependas multe pro la plenumkapablo de la individuo, de la lingvolernadmetodoj, persona pretendemo kaj de tempodaŭro de ĉiutaga lernado, ekzerco.

Alia avantaĝo de ĝia uzo estas: se ĝia ellerno okazas gepatralingvoniëvele, la konversacipartnero povas esti ajna: Afrikanulo, Japano, Germano, Buŝmano, aŭ Anglo, mi tamen tiel sentas: kvazaŭ ni parolus inter ni per mia gepatrolingvo. Kaj ĉi tiu sento estas vera ambaŭflanke. Ĉi tiu sento estas grandioza. Ja, mi ne konas ĉiun el la ekzemple notitaj lingvoj, tamen mi povas kompreni ilin kaj komprenigi min: sendepende de tiu, kiun nacilingvanon mi alparolas. Ĉi lingvo estas de tiuj, kiuj ellernas kaj uzas. Foje, unu mia afrika korespondanto skribis ke ili vidas Esperanton, kiel lingvon de la libereco, kontraŭ tiu fakto, ke en Esperanto nenio ekzistas el la vortotrezoro de afrikaj lingvoj.

La disvastiĝon de Esperanto montras, ke plurmiloj da homoj parolas ĝin en 119 landoj de la Tero, kaj Esperanto-Asocio funkcias en 99 landoj.

Regulaj radiodissendoj okazas el: Pekino, Vatikano, Romo, Varsovio, Vieno, Tallino, kaj el Soulo.

Lingvo de la malgranda popolo, ofte trasuferas, ke devprenas kaj fandas en sian propran lingvon: la nomon de nocioj, aron da esprimoj transprenitajn el grandaj lingvoj (Ekz: el la angla) sen renovigo de propra lingvo, aŭ sen ilia traformo al la propra lingvo. Bedaŭrinde, la pli granda disvastiĝo de ĉi vortoj, povas konduki al la formorto de la malgrandaj nocioj, lingvoj. Konsidere al ĉi tiu danĝersituacio, la Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj proklami la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj, kaj konfidis al Unesko la taskon kunordigi la agadon por la Jaro. Ties Ĝenerala Direktoro, Koïchiro Matsuura skizis en mesaĝo la taskojn de la Jaro. – Lia mesaĝo interalie enhavas la jenan:

„Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj -- malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon -- forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj gxenerale el la publika sfero.

Urgas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj.”

Jes, laŭ mi oni devus fari pli multajn tradukojn el la nacilingvoj al la grandaj – kaj al la perantlingvoj. Ĉi traduko bele progresas rilate Esperanton. Elformiĝis kaj daŭre pluimultiĝas ĝia propra literaturo, kaj daŭre kreskas la nombro de esperantigoj el la nacilingvoj. Veraj artverkoj naskiĝas, kiuj meritas la fieracon plenrajte, de la lingvon parolantoj. Jes, oni devas tiel efiki, ke ankaŭ parolantoj de la grandaj- aŭ regantaj lingvoj, kaj ankaŭ ties uzantoj ellernu pli da lingvoj krom la siaj. Laŭ mi, la nialanda lingvopolitiko bonis dum la 20-a jc. Sed pr. Ekde 20 jaroj la situacio ŝanĝiĝas damaĝe al nia nacilingvo.

La diversaj landoj donas nur anglalingvajn informojn, eĉ ankaŭ la faklitaraturo de diversaj teĥnikaj tekstoj, aperas nur angle. Tiel la lingvo angla praktikas premon sur la hungaran lingvon kaj ankaŭ sur la por ellerni elekteleblajn lingvojn ĉar laŭ influo de la aplikita lingvopolitiko, la plej multo volas lerni nur angle, italan, hispanan, germanan, rusan esperantan ne.

Se ni studas: kiu granda lingvo (kiel reganta lingvo) taŭgus al la lingva-gvidantaro, pri kiu parolas la ĉefdirektoro de UNESCO en sia mesaĝo, ni devas vidi denove la danĝeron de la lingva imperiismo, kvankam la anoncita celfikso havas ne ĉi intencon.

(Rev: László Gados)

- ni daŭrigos –

KUNSENTO

La Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” nun esprimas sincere sian bedaŭron al la familianoj de viktimoj de natur- katastrofoj de Burma kaj Ĉinio



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu